

Leterkesto 10.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-015-A-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-015/SRI-1990-015-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto-10-a.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ni respondas al la 166 aŭskultantoj el 36 landoj, kiuj sendis skribajn mesaĝojn. Tio laŭ la alfabeto ordo de ilia familia nomo.

Hodiaŭ ni salutas Gregoron SARNECKI en Kielce (Pollando), kiu havas 10 jarojn. Esperanton li lernas en la kvara klaso de la elementa lernejo, kaj li ŝatus korespondi eĉ kun plenkreskuloj. Kiu volus esti lia leter-amiko?

A.- Jen lia adreso: Gregoro Sarnecki, Ul. Pocieszka 20/10, 25-519 Kielce, Pollando. Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Pierre SAVOIE en Toronto (Kanado) donas sciigojn en rilato kun intervjuo, kiun ni faris kun s-ro Ed BORSBOOM pri Nikolao KURZENS kaj lia libro "Mia Spektro". Li skribas:

A.- "S-ro BORSBOOM menciis, ke li ne konas la nomon de la kanadano, kiu laboris por la dua (kanada) eldono de tiu libro. Kaj li donas la nomon de la eldoninto: "s-ro Kriss SMILGA, latvodevena kanadano, nun tre aĝa (eble li naskiĝis ne pli ol 10 jarojn post Kurzens mem). Estas vere, ke s-ro Smilga estas klera kaj sperta esperantisto. Ankaŭ eble SMILGA publikigis la libron sole, ĉar en Kanado kaj Usono estas malfacile produkti sian propran libron pere de komputero kaj fotokopiado."

Cl.- La leteron de nia kanada aŭskultanto Pierre SAVOIE ni transsendos al Ed. BORSBOOM en (Nederlando). Amikecojn al Werner SCHAUFELBERGER en Zürich (Svislando), kiu regule aŭskultas majn elsendojn, al Erich SEIDEMANN en Dresden (Germanio orienta), kiu humore diras:

A.- "Viajn zorgojn mi volonte volus havi: ĉu la vilaĝo L. apartenu al la kantono X aŭ Y - ĉe ni en GDR staras la demando: unuiĝi kun FRG duone aŭ tute?"

Cl.- Hamzeh SHAFIEE en Tehran (Irano) sin interese prezentas:

A.- "Mi aŭskultas viajn radioprogramojn ĉiutage kaj ili tre plaĉas al mi. La signaloj de via radiostacio estas tre bonaj kaj fortaj. Sed la tempo de esperantaj programoj estas tre mallonga. Mi komencis lerni esperanton antaŭ kvin monatoj, sed ne sisteme. Nun mi povas kompreni facilajn librojn kaj paroli iomete; antaŭ tri monatoj mi sendis al vi angle leteron kaj poste mi ricevis vian respondon; ĝi estis tabelo de viaj programoj. Mi aŭskultas viajn esperantajn, anglajn kaj kelkfoje arabalingvajn programojn."

Cl.- Jilin SHENG en Waiyu Xi (Ĉinio) skribis:

A.- "Dank' al la aŭtunaj kondiĉoj mi povas informi vin, ke nun preskaŭ ĉiutage mi povas kapti la elsendojn de via stacio disaŭdigataj por Sudameriko sur la frekvenco de 12 035 kilohercoj inter la 22h15 kaj 22h30 laŭ universala tempo. La esperanto-programojn mi nun aŭdas sufiĉe regule."

Cl.- En alia letero, la ĉino Jilin Sheng esprimis la deziron ricevi mapon de Svislando kun la kantonoj, por povi situigi la menciitajn okazaĵojn. Ni provos kontentigi lin kaj eble aliajn geografiemulojn, kiuj skribos al Svisa Radio Internacia. Karl SIGURDSSON en Reykjavik (Islando) skribis:

A.- De tempo al tempo mi aŭskultas elsendojn de SRI. Plej ofte mi bone aŭdas, kaj la elsendo estas sen ĝeno de aliaj stacioj.

Cl.- La islandanoj estas tiurilate feliĉaj. Saluton al Hanna kaj Heinz SCHINDLER en Schwelm (Germanio okcidenta) kaj al Jean SOREL en Quebec (Kanado), kiu konstatis, ke la jaŭdon 13-an de decembro aŭdiĝis elsendo ne en esperanto, sed en la romanĉa. Tio estis verŝajne eraro. Li profitas la okazon por informiĝi pri historiaj kaŭzoj de la malsimilaj manieroj nombri en la franca lingvo ekde sesdek ĝis cent.

A.- Estis pluraj manieroj nombradi en la teritorio, kie nun estas parolata la franca lingvo en Francio mem kaj en la francaj partoj de Belgio kaj Svislando. La gentoj, kiuj sidis surtere kaj ne portis ŝuojn tendencis nombri per dudekoj, tio estas per la fingroj de la manoj kaj piedoj. Fakte la nombrado en la franca lingvo konservas spurojn pri tiu dudekuma sistemo. Oni ne diras plu **deux-vingts** (du-dudek), nek **trois-vingts** (tri dudek), sed konserviĝis la nombro **quatre-vingts** (kvar-dudek). Kaj ekde sesdek ĝis cent oni uzas la dudekuman sistemon. Sepdek oni diras **soixante-dix** (sesdek-dek), kaj sekvas **soixante et onze** (sesdek kaj dekunu), **soixante douze** (sesdek dekdu), **soixante treize** (sesdek dektri), **soixante quatorze** (sesdek dekkvar), **soixante quinze** (sesdek dekkvin), **soixante seize** (sesdek dekses), **soixante dix-sept** (sesdek dek-sep), vi certe rimarkis, ke ĝis **dix-sept** oni havas nedekumajn vortojn, ankaŭ spuro pri la dudekuma sistemo. Sekvas **soixante dix-huit** (sesdek dekok), **soixante dix-neuf** (sesdek deknaŭ), **quatre-vingt** (kvar dudek), **quatre-vingt un** (kvar dudek unu), **quatre-vingt deux** (kvar dudek du), ktp ĝis **quatre-vingt dix-neuf** (kvar dudek dek naŭ) por fine alveni al **cent** (cent).

Cl.- Ne ĉie oni dudekumis. En Svislando oni nombris nur sur la bazo de la dekoj, tio signifas, ke oni havas nomojn por diri sepdek (septante) kaj por naŭdek (nonante), ĉar oni neniam uzis la piedfingrojn por nombradi, nur la manfingrojn. Plej kurioze estas la nombro okdek. Proksime de Francio, en la kantonoj Ĝenevo kaj Neŭŝatelo oni perdis la nomon kaj ekuzis la strangan formon **quatre-vingt** (kvar dudek), dum en la kantono Vaŭdo oni diras **huitante** kaj en la kantono Friburgo oni diras **octante**. Por diri okdek tri, se sviso diras huitante trois, oni povas esti preskaŭ certa, ke li estas vaŭdano, se li estus friburgano, li dirus **octante trois**, kaj se li estus neŭŝatelano aŭ ĝenevano, li dirus **quatre vingt trois** (kvar dudek tri). Por distingi neŭŝatelanon de ĝenevano, oni devas aŭdi, kiel ili diras ekzemple naŭdek tri. La neŭŝatelano diras **nonante trois** (naŭdek tri) kaj la ĝenevano ĝenerale **quatre vingt treize** (kvar dudek dek tri), kiel la francoj.

A.- En Svislando tiuj regionismoj rezistis al la pariza uzo, ĉar la kantonoj estas rilate al la instruado absolute sendependaj. Kontraŭe en Francio la Departementoj ne estas aŭtonomaj. Tial la pariza uzo elimini la lokajn uzojn. En Sudfrancio la kamparanoj ankoraŭ nombras kiel la svisoj, sed la lernejoj devas uzi la parizan dudekuman sistemon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontan semajnon. Ĝis reaŭdo!